

ISSN 0023-3692

KONTAKTO

numero 243 (2011:3)

Scienco
Artefarita intelekto

Mondo
La plej granda subtera
urbo en la mondo

El Ĉinio
Ĉinaj Freskoj

La nova muzika erao

Morto de ko-disko, mp3 kaj la
estonto de la Esperanta muziko

Irek Bobzrak, la vocô kaj animo de Varsovia Vento-podkasto



tejo

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo



tejo.org



MANĜI, TRINKI KAJ MEMBRI EN TEJO

Tri bazaj nepraĵoj por povi ĝui la vivon. Ni provu menciigi kelkajn kialojn, kial bonas esti individua membro en TEJO, kvankam ili multegas: Vi estos en kontakto kun tutmonda juna E-komunumo; malkovriĝos al vi bunta kultura diverseco pere de la renovigita revuo Kontakto, kiun ĉiu membro ricevas; tutmonde gastos kaj gastigos pere de Pasporta Servo kaj vi ankaŭ povos pli favore preze aliĝi al IJK, la plej granda renkontiĝo de junaj esperantistoj el la tuta mondo.

Ĉion pri aliĝo al TEJO vi trovas ĉe:

<http://www.tejo.org/eo/membrigho>



Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 243 (2011:3), 46-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-paĝo: <http://kontakto.tejo.org>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10
436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ri-
beirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@
tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski

Enpaĝigo: Romulo Felicio

Korektado: Rob Moerbeek kaj Manuela Ronco
(teknika helpo)

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skon-
pres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Aleksander Osincev
(Rusio), Alexandre Baudry (Francio), Olubunmi
Osho-Davies (Niĝerio), Victor Solé (Katalunio),
Simmon K. Barney (Usono), Etsuo Miyoshi (Ja-
panio), Ivo Miesen (Nederlando), Vasile Gavrilan
(Moldavio). Facilingvaj artikoloj estas verkitaj en
la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de
Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia retpaĝo.

Anoncarifto: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR,
1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30
EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por
E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekster-
movadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por
anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu
vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia
retejo.

Malfortvidantoj: Estas kelkaj voĉlegitaj artikoloj en
nia retejo. Pliajn oni povas peti de Vasile Gavrilan
<pangavrilan@gmail.com>. Kasedlegantoj sendu
po du kasedojn de 90 minutoj al Rob Moerbeek,
Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Ne-
derland. Kun la poŝta glumarko de "Cécogramme"
(viro kun blanka bastono).

Kontakto en radioj: Radio 3ZZZ: <http://www.3zzz.com.au/>



ĜD Edukado kaj Kulturo

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la
Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur re-
flekta la vidpunkto de la unuopaj aŭtoroj, kaj
la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna
uzo de la informoj.

*La redakcio kaj la eldonanto ne
respondecas pri la opinioj de
unuopaj aŭtoroj.*

Redakcie




Foto: Manuel Pancorbo

*"Poto muldas la malplenen kaj muziko muldas la
silenton" asertis la franca skulptisto kaj pentristo
Georges Braque. Fakte sen muziko ekzistus nur bruo
kaj silento. Mi fakte ne konas iun, kiu ne ŝatas aŭskulti
ian muzikon. Por miaj geavoj la radio-aparato estis la
ĉefa elsendilo per kiu ili povis ĝui la tipan kamparanan
muzikon de siaj tempo kaj regiono. Tra la jaroj, la
muziko ŝanĝiĝis, sed plejmulte ŝanĝiĝis la rimedoj
kaj aparatoj per kiuj oni ludas muzikon. De pezaj kaj
malpezaj vinilaj diskoj, kasedoj, kompaktaĵaj diskoj ĝis
la nuntempaj ciferecaj formatoj, kiuj permesas al ni aŭskulti muzikon per komputilo kaj
portebaj mp3-ludiloj, ŝajne ĉiam pli kaj pli facile oni ĝuas muzikon.*

*Sed kiel influas la novaj teknologioj por tiuj, kiuj kreas kaj produktas muzikon? De
preskaŭ jardeko oni prikomentas grandan krizon, kiu atingas muzikeldonejojn. Nia
ĉefartikolo pritraktas tion kaj alportas interesan prezenton pri la situacio de eldonejo,
kiu dediĉas sin ekskluzive al produktado, distribuado kaj vendado de Esperanta muziko:
Vinilkosmo. Ĉu elŝutado malhelpas artistojn? Rogier Huurman konvinke asertas ke
elŝutado tre helpas artistojn, kaj ke la novaj leĝoproponoj por protekti kopirajton
malrespektas la konstituciajn rajtojn de la civitanoj. Konktrakto ankaŭ enketis kelkajn
homojn por scii ĉu ili ankoraŭ aĉetas ko-diskojn kaj kiam laste ili faris tion.*

*El la lastatempaj manieroj utiligi la internacian lingvon troviĝas la radio-programoj
dissendataj per Interreto. La tiel nomataj "podkasto" multe populariĝis, grandparte
danke al la kreemaj elsendoj de Varsovia Vento. Vi nun havas la ŝancon koni iom pri
la funkciado kaj laboro de la skipo gvidata de Irek Bobrzak. Mi mem estis intervjuita
kelkfoje de Irek por la programoj, do kun reciproka estimo kaj admiro ni intervjuis lin
por ĉi tiu eldono.*

*Ni bedaŭrinde ne tre ofte ricevas kontribuojn el Azio, tial ni ĝojas ke ni partnerece kun
la redakcio de la retejo "El Popola Ĉinio" starigis rubrikon "El Ĉinio", kie ni prezentos iom
pri la Ĉina kulturo, socio kaj aliaj flankoj de la vivo en Ĉinio. Ni daŭre bonvenigas pliajn
kontribuojn de azianoj! En la rubriko "Scienco" vi legos ke, kvankam la teknologio ne
ĉesas gapiĝi nin tago post tago, laŭ Gregorio Naçune ni ne tre frue vidos komputilojn, kiuj
povas imiti la homan intelekton. Per tre kompetenta artikolo li montras kial la komputiloj
ne povas krei artefaritan intelekton.*

*Vasile Gavrilan el Moldavio rakontas ke la plej granda subtera urbo de la mondo
troviĝas ĝuste en lia lando kaj ke ĝi konservas la plej grandan vinaron de la mondo. Se
vi ŝatas poezion vi certe plezure legos pri unu el la plej grandaj poetoj de la portugala
lingvo - Fernando Pessoa. En "Fikcio" Thierry Salomon prezentas tre interesan rakonton
pri iu moderna drogo kaj en la "Blaga Bloga" de Viktoro Solé kuracisto avertas ke la
cerbo havas limigitan kapablon akumuli informojn, tial oni devas bone elekti tion, kion
oni decidis enkapigi. Vi ankoraŭ ĝuos en ĉi tiu eldono la facillingvan artikolon de Sten
Johansson - "La Ĉokolada Kuketo" kaj la novaĵojn pri la Junulara Movado en TEJO-
Tutmonde redaktata de Dan Mrázek.*

*Ĉi tiu numero aperas iom prokrastite pro la Esperantaj kongresoj jarjeze, sed ni
rapidigos la aperon de venonta eldono por kompensi tiun etan malfruon. Ne forgesu ke
viaj reagoj estas ĉiam bonvenaj eĉ se temas pri (laŭ konata esprimo) "Bla Bla Bla". =)*

Rogener PAVINSKI

ENHAVO

Reagoj, novaĵoj	4
Intervjuo Irek Bobrzak - La vocô kaj animo de Varsovia Vento-podkasto	5
Fikcio Moderna drogo	8
Poezio Fernando Pessoa	9
Ĉefartikolo La nova muzika erao	10
Leĝoj kontraŭ elŝutado ne helpas artistojn	13
Scienco Artefarita Intelektlo	14
Facila La ĉokolada kuketo	16
El Ĉinio Ĉinaj Freskoj	17
Mondo Mileŝtj Miĉj - La plej granda subtera urbo en la mondo	18
La blaga blogo Bloga de lingvleranto	19
TEJO tutmonde	20



Viaj reagoj kaj komentoj estas bonvenaj. Kontaktu nin per la retadreso kontakto@tejo.org

La nova numero de Kontakto estas elstara! Mi atendas la paperan version por kisi ĝin

@VerdaLando per Twitter

Kun miro mi legis la kontribuojn de E-aŭtoroj pri la atomcentraloj. Post la akcidento en Fukuŝimo ne plu eblas nei la riskon de atom-energio. Mia filo kaj mi partoprenis manifestaciojn en Svislando por la tuja ĉesigo de tia teknologio.

Dieter ROOKE – Svislando
per retmesaĝo

Temo-sugestoj

Ĉu vi ŝatus verki por Kontakto, sed mankas inspiro?

Ni proponas al vi kelkajn temojn kiel sugestojn pri artikoloj por venontaj numeroj de Kontakto.

Sentu vin libera ankaŭ por fari proponojn. Ni bonvenigas vian partoprenon!

Jen sube la aktualaj temo-sugestoj: (pliaj detaloj pri ili troviĝas en nia retejo kontakto.tejo.org)

Interreto: Ĉu nenies teritorio?

Ĉu la Interreto estas la plej proksima atingo al pura demokratio? Aŭ ĉu ĝi estas simpla nenies teritorio, kie ĉiu povas fari kion ajn oni volas?

Drogoj: Krimaj aŭ laŭleĝaj?

Kiel oni konsciigu pri iliaj danĝeroj? Ĉu la malpermeso estas efika? Ĉu laŭleĝigi ilin estas la plej bona solvo?

Recikligo kaj rubaĵoj

La destino de rubaĵoj estas akuta problemo en nia nuntempa socio. Recikligo fariĝas pli kaj pli grava kaj necesa en la mondo.

Tabako

Malgraŭ la nuntempa provo sieĝi ĝian reklamadon kaj konsumadon, cigaredoj estas unu el la plej vendataj produktoj en la mondo.

Polemikaj tradicioj

Ĉu en via lando aŭ regiono ekzistas polemikaj tradicioj, kiuj ne plu kongruas kun la ĉirkaŭa aŭ kiuj vekas kritikojn el parto de la socio?

Astrologio

Sciencistoj rigardas la stelaŭguradon kiel ŝajnskiencon aŭ superstiĉon. Kaj vi, kion vi opinias pri la temo?

Hejmbestoj

Kian rolon havas la hejmbestoj en la homa vivo?

Ĉu mono ŝanĝas la homon?

Ĉu vi konas personon, kiu draste ŝanĝiĝis pro riĉiĝo aŭ povo-akiro?

NOVAĴOJ

Intervjuo

La ĉefredaktoro Rogener Pavinski estis intervjuita en la 71a elsendo de podkastaj programoj de Varsovia Vento. Rogener respondis plurajn demandojn ĉefe pri Kontakto. La programo aŭskultblas ĉe: <http://www.podkasto.net/2011/05/30/la-71a-elsendo/>

Premioj

La revuo Kontakto, partnere kun la disko-eldonejo Vinilkosmo, por la dua fojo lotumis premiojn inter la kontribuantoj de Kontakto. La premioj ĉi-foje estis tri MP3-formaj albumoj de Dolchamar – Trajn' nenien. La gajnintoj estis Viktoro SOLÉ, Toño del BARRIO kaj Kiah MORANTE. Gratulon!

Prelego

Prezentis la revuon Kontakto la ĉefredaktoro Rogener Pavinski dum programero kadre de la Tutamerika Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo, Brazilo. Estis montrita iom pri ĝia historio, ĝiaj trajtoj kaj ĝia aktuala formato kaj novaĵoj.



Irek Bobrzak

La vocô kaj animo de Varsovia Vento-podkasto

ROGENER PAVINSKI (BRAZILIO)

“Kiam blovas vento tia, kiel la Varsovia, la homoj plenĝoje kunvenas”. La unua frazo el la kanzono “Varsovia Vento” de Ale Kosabela esprimas ĝojon “spiri tiun venton liberigan”. Fakte, en 2006 ekblovis en la mondon nova freŝa vento: La 12an de februaro de tiu jaro aperis la unua elsendo de Varsovia Vento-podkasto.

Varsovia Vento estas la nomo de la E-Klubo en la pola urbo, kie aperis la Unua Libro de Esperanto. Inter ĝiaj aktivaĵoj, la ĉefa kaj plej atentinda estas la realigado de la tre konataj elsendoj en podkasta formo. La elsendoj, reĝisorataj de Irek Bobrzak kun lia skipo de kunlaborantoj, estas tre verŝajne la plej aŭskultataj en la internacia lingvo. Inter la aliaj ekzistantaj kaj ekzistantaj iniciatoj, ĝi alportis “salon al la supo”. Tiu salo estis ĝuste la juna etoso, la ridoj kaj amuzo kaptitaj en diversaj renkontiĝoj tra la mondo.

Ĝi fakte venis helpi plenigi truon, kiu ekzistis en la E-a kulturo. Ĝi nun posedas belegan arkivon plenan je intervjuoj kun artistoj kaj aktivuloj sed samtempe kun simplaj kaj ordinaraj personoj de nia komunumo. Irek, kiu ankaŭ estas aktivulo de la Pola E-Junularo kaj organizanto de renkontiĝoj, kiel la jarfina JES, donis intervjuon al Kontakto, per kiu li rakontas pri la laboro, atingoj kaj estonto de VV.

La varma kaj baso-tona voĉo de Irek, kiu ĉiam salutas komence de la elsendoj, diras al vi: bla bla bla!

Kiel vi komencis dediĉi vin al kreado de Esperanta-podaksto?

En la Unua Libro, kiun ŝajne multaj el inter vi vidis, Ludoviko Zamenhof petas ĉiun, al kiu plaĉas la ideo de la lingvo internacia, pri

helpo ĝin disvastigi. La peto estas simpla, modesta kiel li estis. Kiam do mi eksciis pri Esperanto, ekkonis ĝian ideon kaj trovis ĝin por mi interesa kaj utila, mi decidis al la peto iel respondi. Des pli ĉar li anoncis

sian eltrovaĵon kiel donacon por la homaro kaj mi ne bezonis pagi pro ia ajn kurso. La libron pri Esperanto senpage mi ricevis de mia amiko, la lingvon senprobleme mem mi lernis. Miaj gepatroj instruis min ke pro ricevita donaco takte estas danki. Tiel do komenciĝis la materiigo de kelkaj miaj E-ideoj, inter ili ankaŭ de la retaj radio-programoj de Varsovia Vento.

Kiam vi komencis, ĉu estis aliaj similaj iniciatoj, kiuj influis vin?

Fakte neniuj influis min. Simple mi konstatis, ke en la esperantistaj disaŭdigoj io mankas. Kiam mi eksciis pri radio-programoj en Esperanto, tuj mi provis ilin aŭskulti. La tempo tiam estis iom alia – la reto ankoraŭ bebumis. Kun nostalgio do mi rememoras la periodon, kiam kvazaŭ kun sento de ĉasisto en arbaro de diversaj radio-bruoj pere de mia portebla radio-ricevilo kun pacienco mi serĉadis sonojn la plej valorajn. Ĉi tie, en Pollando, eblis kapti disaŭdigojn el Pollando, Ĉinio, Aŭstrio kaj Italio. Poste populariĝis la reto. En ĝi mi trovis pli da programoj, ankaŭ diversajn podkastajn provojn, el inter kiuj tiam plej logis



Irek kaj Marta dum forkuro bicikla ekster la urbo

mian atenton Radio Verda el Kanado. Ekde la komenco mi provis ĉiam ĉion registri por ke mi aŭskultu tion trankvile dum promenadoj kun mia hundo, dum vojaĝoj. Tiel aperis en mia vivo ia kutimo, ankaŭ la unuaj rimarkoj, ke kvankam mi aŭdas Esperanton sporade, la programoj

de la esperantista etoso, humuro. Tial aperis en mia konscio la ideo de elsendo, kiu koncernos Esperanton, ĝian movadon, kulturon, ankaŭ historion, kaj iom malpli oficiale, pli distre. Kaj post kelka tempo ekblovis Varsovia Vento, bla bla bla.

Kiam aperis la unua elsendo de VV? Kiu estis ĝia enhavo?

La unua programo aperis la 12an de februaro en 2006. Ĝi daŭris iom pli ol 16 minutojn, en ĝi eblis aŭskulti iom pri la ideo, voĉojn de la Varsovia Vento-klubanoj kaj de eksterlandaj gastoj, kiuj tiam vizitis Varsovion. Krom tio prezentitaj estis raporto pri Interlingvistikaj Studoj en Poznano, Pollando, kaj reguloj ludi skrablon en Esperanto.

“Mankis salo en la supo pri la gaja movado kaj ĝoja vivo kun Esperanto, tute mankis respegulo de la esperantista etoso”

koncernas Esperanton. Mankis salo en la supo - por mi. La lingvo ja havas siajn riĉan kulturon, historion, movadon. Kompreneble estis la gazetaro, revuoj, libroj, tamen legi pri muziko aŭ aŭskulti ĝin estas ja io diferenca, ĉu? Iom poste mi venis al la konkludo, ke ĝenerale la programoj estas tendence, eĉ ĝis doloro seriozaj. Tio ne signifas malvaloraj, ne komprenu min tiel, tamen por la novulo, kiu ĉiam aŭskultas pri la monda amikeco, pri la gaja movado kaj ĝoja vivo kun Esperanto, en ĉi-ekzemplo tute mankis respegulo



Irek dum JES en Zakopane 2009. Foto Ivo Miesen

Kiel evoluis la laboro prepari tiujn podkastojn? Ĉu io ŝanĝiĝis de la unuaj elsendoj ĝis la nunaj?

Kiel? Malrapide. Ja mi estas nek ĵurnalisto, nek spertulo pri radio-

laboro, nek havis kaj havas tempon vere okupiĝi pri tio. En Esperantujo mi aktivis en la junulara medio de mia klubo, zorge mi dediĉis min por helpi la reaperon kaj agadon de Pola E-Junularo, krom tio mi estis kaj plu estas organizanto de sufiĉe grandaj esperantistaj eventoj, inter kiuj troviĝas la 61a IJK, kelkaj AS-oj (Ago-

Semajno), la junulara programo dum la UK en Bjalistoko kaj nun JES (Junulara E-Semajno). Al mi do ne eblis kaj ĝis nun ne eblas vere meti atenton nur al tiu ĉi projekto. Kaj kiam mi komencis okupiĝi pri la elsendoj, fakte mi havis nur mian propran kaj nematuran, eĉ iom naivan imagon pri tio, kion mi ŝatus fari. Tuj evidentiĝis, ke ne sufiĉas simpla mikrofono kaj komputilo, ke mi bezonas pli da tempo labori ol mi imagis, kaj krome ke necesa estas ankaŭ mono por starigi taŭgan retejon, ebligantan libere elŝuti la programojn. Sen ekstera helpo do, nur en la medio de miaj geamikoj, paŝo post paŝo mi solvis ĉiujn malfaciligojn kaj tiel ni alvenis ĝis nun. Kompreneble, survoje, la programoj evoluis, ŝajne fariĝis iom pli maturaj, pli interesaj, pli kvalitat, sed ĉiam, kiam mi sidas antaŭ mikrofono, mi havas la impreson, ke mi komencas, ke ĵus mi startis.

Kiom regule la elsendoj aperas?

Laŭplane du-foje en monato krom la somera kaj la vintra paŭzoj, dum kiuj aŭ mi ripozas aŭ ion helpas organizi. Sed bedaŭrinde ne ĉiam tio sukcesas. Prilabori la sonmaterialojn evidentiĝas mult-foje tasko vere temporaba kaj ofte postulas pli da tempo ol mi havas. Se dume okazas io, kiel ekzemple nun gravaj antaŭpreparoj al la 3-a JES, kio ankaŭ postulas apartan atenton, tiam vere malfacilas sekvi ian planan ritmon.

Kiel funkcias la kunlaboro kun lokaj kaj eksterlandaj redakciajnoj?



La ĉarma parto de la redakcio Agnieszka (Rudzia), Marta (Martusia) kaj Goška (ME) dum registrado de sia programero

“Ĉiu danko, ĉiu reago estas kvazaŭ groŝo, kiu pliriĉigas nian monujon kaj motivas nin pli multe labori kaj krei”

Pri samo fakte mi demandis vin en la intervjuo pri Kontakto. Kaj simile mi povas respondi. Ne funkcias sen engaĝiĝo, interesiĝo kontaktiĝi kun homoj, sen petoj, sen zorgo, sen aktiveco mem akiri la novan materialon. Fakte kelkaj aŭskultantoj fariĝis vere fidelaj kunlaborantoj, de kiuj neniam mi devas ion peti. Inter ili plej aktivis Platano (PafKlik), Eric (Inicialoj DC), ankaŭ Ari el Kubo. Tamen al ĉiuj, kiuj pliriĉigis kaj pliriĉigos la programojn je siaj kontribuoj, kore mi dankas. Mi sentas grandan ĝojon kaj honoron tiel labori kun ĉiuj vi por la bono de nia kuna Esperanto.

Kiuj konsistigas la redakcion, kion ili faras kaj kiel la taskoj estas dividitaj?

En la redakcio Marta, kiu fervore kontribuas per prilaboro de la sonmaterialoj, Tomek, kiu kaŝe zorgas pri la informadika flanko de la retejo, por ke senprobleme vi elŝutu la elsendon, voĉe la klubanoj de Varsovia Vento, el kiuj ŝajne al la plej konataj nun apartenas Małgorzata (Goŝka – Me) kaj Agnieszka (Rudzia), kaj mi, kiu okupiĝas pri ĉio, interalie pri muntado de la programo kaj pri la enhavo de la paĝo.

Mi ŝuldas klarigon pri la nomo de la klubo kaj de la podkasto. En 1887, ankaŭ en Varsovio, aperis la Unua Libro. De mia naskiĝurbo ekblovis do en la mondon vento de la espero. Varsovia Vento. Kaj ankaŭ mi mem estas kvazaŭ vento. Mi ŝatas kiam io marŝas antaŭen, evoluas. Do tial ĝuste la penso pri la podkasto fariĝis karno.

Ĉu vi ricevas ian rekompenccon pro via laboro? Kio movas vin daŭrigi?

Neniu pagas al ni, neniu krom ni mem nin subtenas, do se ni parolas pri ia ajn rekompenco, simple mi povas diri, ke la reagoj de la aŭskultantoj estas la ununura salajro, kiun simple ni ricevas. Ĉiu danko, ĉiu reago estas kvazaŭ groŝo, kiu pliriĉigas nian monujon kaj motivas nin pli multe labori kaj krei.

Kiu estis por vi la plej memoriga(j) intervjuo(j), kiu(j)n vi faris por VV?

Ankaŭ vi bone scias, ke ĉiuj kontribuoj estas memorindaj kaj valoraj. Tiel okazas, ke la plej multaj intervjuoj, kiujn mi prezentis en la programoj, estis aŭ kun miaj geamikoj aŭ kun miaj gastoj. Tamen ne gravas, kiu el inter ili estis fama, evidentiĝis pli lerta dum la intervjuo aŭ pli interesa. Ĉiuj ni estas sur la sama ŝipo, do por mi plej mojosas, ke ĉiuj ni parolas Esperanton kaj kune ni ĝojas pro tio.

Kiuj estas la atingoj de VV laŭ vi?

Sendube la sufiĉe granda, laŭ la esperantista mezuro, kvanto de la homoj, kiuj elŝutas la programojn. Iom triste, speciale por la junaj redakcianoj, kiuj fakte multe laboras, ke la elŝutantoj, kiuj probable aŭskultas kion ili elŝutis, apenaŭ reagas. Nia salajro do, pri kiu jam mi menciis, estas draste modesta kaj se ni decidus pro ĝi vivi, simple ni ne travivus. Tia estas la vero. Alia atingo, ankaŭ grava, ke ekde la komenco ĝis nun ne ripetigis la sonmaterialo kaj ĉiam ni sukcesas prezenti ion freŝan.

Kion vi planas por la estonto en Varsovia vento?

Certe laboron pri ankoraŭ pli valora enhavo. Antaŭnelonge komenciĝis la dua provo prezenti ion en la etoso



Dum Ago-Semajno 2008

de radio-dramo, ĉi-foje kunlabore kun Jerzy Fornal, profesia aktoro, kiu konsentis prezenti en la programoj la verkon de Izrael Lejzerowicz “El la Verda Biblio”. Ŝajnas ke la provo iĝas tre sukcesa. Krome ni laboras pri kelkaj aliaj projektoj por ke la programoj estu interesaj kaj valoraj, sen tro frue pri tio paroli. Sekvu la programojn, mem vi malkovros.

Se vi povus intervui Zamenhofon por viaj elsendoj, kion vi demandus?

Mi estas nur ordinara homo, kiu ĉiutage devas matene vekigi por veni al la laborejo kaj nur kiam eblas forkuri el la urbo por pasigi tempon ie en la naturo, mi forkuras. Kiel mi menciis mi ne estas profesia ĵurnalisto, do ne vere mi scias, pri kio lin mi demandus. Certe mi dankus al li pro Esperanto. Sendube! Kaj tion mi farus kun vera amo en la koro. Kaj tiam, mi supozas, ke kortuŝita pro la danko li mem komencus paroli. Tion mi simple registrus :).


www.podkasto.net

La oficiala retejo de Varsovia Vento, kie aŭskultebblas la elsendoj

www.vinilkosmo-mp3.com

Vi povas tie aŭskulti fragmenton aŭ aĉeti la kanzonon “Varsovia Vento” de Ale Kosabela.

Dum interparolo kun Éric Languillat (Inicialoj DC) marte, en Varsovio



Moderna drogo

THIERRY SALOMON - HUNGARIO

Sonoris la poŝtelefono.

Alvokis Andreo: "Saluton Tom, alvenis nova dozo. Tricent gramoj por ducent kvardek eŭroj. Ĉu interesas vin?"

- "Jes. Ĉu la kutima loko?"

- "Bone, ni renkontiĝu tie post tridek minutoj".

Jam de tagoj Tom havis teruran mankosenton. Ekde la lasta vendredo li ne uzis tiun psikaktivigan drogon. En la lifto Tom ludis per sia poŝtelefono. Ĝi havis la kutimajn funkciojn: fotado, filmado, radio kaj televido. Sed ĝi estis speciala modelo kun ĉifrada kapablo, aĉetita nigramerkate. Alikaze ne eblus paroli telefone pri tiaj aferoj

kun Andreo kaj aliaj "negocistoj".

Du tagojn poste, kuŝante sur la kanapo, li rememoris la ĵus travivitajn spertojn. Li havis la impreson, ke lia menso flugis el lia korpo, bildoj aperis antaŭ liaj okuloj kaj kiel ĉiam, plej bona estis la forgeso de la ĉiutagaj zorgoj. Sed nun poste li sentis sin laca. La brakoj doloris, la okuloj pikis. Kaj la plej videbla kromefiko konsistis el apatio kaj nigraj saketoj sub la okuloj.

Timante pri sia sano li jam plurfoje provis ĉesi. Sed ĉiam li refalis. Nuntempe grandan parton de lia

salajro forvoris lia dependeco.

Tom prenis la unuan dozon kiam li aĝis ĉirkaŭ dek tri jarojn. Fakte pli pro enuo ol pro scivolemo. Hazarde li trovis kvanteton kaj li provis ĝin. Ĝi ne estis tre bonkvalita, sed tamen li spertis la forŝvebon. Li eĉ nun rememoris la odoron de la blanka materialo, la senton kapabli vojaĝi en spaco kaj tempo. Tiutempe ĝi estis ankoraŭ sufiĉe facile akirebla, precipe en grandaj urboj. Sed poste la registaroj pli kaj pli draste batalis kontraŭ ĝia uzo. Unue per kampanjoj en televido substrekante la riskojn de la narkotaĵo (dependeco, laceco, torporiĝo de la brakoj, okulproblemoj, revemo, perdo de la realecosento, nekapablo labori, aŭtismeco, tendenco al kontraŭsociaj agadoj, ktp...) kaj poste per pli severaj leĝoj.

Nuntempe oni devis aĉeti ĝin "sub la mantelo". Kaj eĉ por simpla uzanto la sankcioj estis drastaj. Se ne paroli pri la "negocistoj", kiuj riskis fini sian tutan vivon en malliberejo. Sed ili bone enspezis dume. Kiel ekzemple Andreo.

Kelkfoje tio pensigis Tom pri la Aztekoj, Inkaoj kaj aliaj indianoj, kiuj krom tabako tute libere maĉis kaj uzis kokafoliojn antaŭ la alveno de la eŭropanoj. Kokaino fariĝis kontraŭleĝa, nikotino ne.

Nur antaŭ kvar jaroj li fariĝis vera dependa uzanto. Antaŭe li nur de

tempo al tempo metis sian nazon en dozon. Sed post kiam amiko konatigis lin kun reto, kiu vendas bonkvalitan varon (interalie sudamerikan), anstataŭ du-tri foje monate, li devis akiri novan unu-du foje semajne.

Plejofoje la stoko sufiĉis por kelkaj tagoj, kelkfoje dum unu nokto li foruzis la tuton por fuĝi en fantaziajn mondojn kaj forgesi la realecon kaj ĝiajn problemojn.

"Saluton Andreo, mi bezonas plian kvanton. Ĉu vi havas de la sama produktanto kiel lastfoje?"

- "hJes."

Post duonhoro ili renkontiĝis en malluma strateto. Andreo transdonis la pakajon.

"Flaru, ĝi estas vere bonkvalita".

La nazo de Tom sentis la iom fungecan kaj polvecan odoron. Li pagis kaj zorge kaŝis la aĵon en la interna poŝo de sia mantelo.

"Dankon, kaj ĝis."

Promenante laŭ la granda avenuo, li ne tro atentis pri la grandegaj televidaj ekranoj muntitaj en la bushaltejoj kaj sur la fasado de la konstruaĵoj. Kelkajn stratojn pli malproksime li vidis du policianojn. Li provis spiri per la ventro kaj aspekti senkulpa. Post kiam li senprobleme preterpaŝis la policianojn li senpeziĝis, kaj komencis piediri pli rapide por povi uzi la materialon kiel eble plej baldaŭ. Sed kvincent



metrojn de sia loĝejo li subite ekvidis pliajn policianojn kun hundo. Li jam troviĝis tro proksime de ili, ne videblis flanka strato en kiun elfuĝi kaj ne eblis retroiri sen vekaj suspektoj. Tom provis denove blufi. Li rekte iris en la direkto de la policianoj. Ili salutis kaj petis lian identigilon.

Li provis respondi al la saluto per natura voĉo kaj montris la petitan dokumenton. Por ŝajni pli senkulpaj li demandis ĉu okazis io speciala en la kvartalo. La plej aĝa policisto respondis ke ne, nur rutinaj kontroloj. "Agrablan vesperon sinjoro", ili diris. Ankaŭ Tom ĝisis. Li jam troviĝis du metrojn malantaŭ ili, kiam la hundo komencis bojeĝi en lia direkto kaj streĉi la rimenojn.

"Atendu Sinjoro, mi petas!"

Tom sentis, ke estus vane provi fuĝi. Ili havis armilojn, kaj se ili ne, la hundo certe kurus pli rapide ol li. La uniformuloj ĉirkaŭis lin. La hundo bojeĝis kaj salivaĉis kontraŭ lia ventro. La plej altranga policisto traserĉis Tom kaj baldaŭ trovis la pakajon. Li malfermis ĝin kaj fajfis:

"Nu, vidu kion ni havas ĉi tie! Pli ol ducent gramojn. Vi estas matura por kelkaj jaroj en malliberejo. Jen serĝento, metu tion en la saketon de la pruviloj".

Tom svenemis. La damna hundo daŭre bojis. La policianoj tenis ĝin tre forte per la brakoj kaj tio doloris. Preninte la hermetike fermitan saketon de sia subulo, la ĉefo svingis ĝin antaŭ la okuloj de Tom. "Eble se ni iom prilaboras lin, li konfesos de kiu li akiris tiujn okdek foliojn de bonkvalita varo". En la travidebla plasta saketo antaŭ la vizaĝo de Tom kuŝis libro. Literatura verko, kiun li neniam legos kaj kies paĝojn kaj inkon li neniam snufos... ■

Fernando Pessoa

ĤOD KRISTOVO - BRAZILIO

En 1972, la eldonejo Stafeto (poemoj - noveloj - dramoj - eseoj) eldonis 1000 ekzemplerojn de l' libreto "Vojo kaj Vorto" de Roberto Passos Nogueira. Mi ne scias ĉu poste estis aliaj eldonoj, sed la katalogo de UEA ankoraŭ vendas tiun 72-an eldonon. La libro estas minimume

genia. Kaj la originalaj poemoj kaj la tradukitaj estis tre trafaj kaj taŭgaj elektitaj, tial la legado de la libro estas senfina... mi ĉiam povas legi

kaj relegi ĝin kaj mi ĉiam surpriziĝas.

Sed tiu ĉi artikolo ne temas pri R. P. Nogueira, sed pri Fernando Pessoa, genia poeto, kies poemero estis genie tradukita de Nogueira en "Vojo kaj Vorto".

Fernando Pessoa, kiu naskiĝis en Lisbono, Portugalio, en 1888, kreis plurajn pseŭdonomojn (Álvaro de Campos, Alberto Caiero, Ricardo Reis, Bernardo Soares ktp...). Ĉiu heteronimo havis siajn proprajn personajn vivon, historion, verkstilon ktp, tial sorbi la verkaron de Fernando Pessoa estas granda laboro, ĉar li ja estis tre densa verkisto, kvankam li tre simple kaj klare verkis. Tio rimarkeblas sube:

El la gardisto de brutaroj

(Alberto Caiero)

XXXIX

La mistero de la aĵoj, kie ĝi estas?

Kie ĝi estas, kiu ne aperas

Eĉ por sin montri mistero?

Kion scias pri ĝi la rivero kaj kion scias la arbo?

Kaj mi, kiu ne scias pli ol ili, kion pri ĝi scias?

Ĉiam kiam mi rigardas la aĵojn kaj pensas pri kio la homoj pensas pri ili,

Mi ridas kiel rivereto sonanta freŝe sur ŝtonoj.

Ĉar la sola kaŝita senco de la aĵoj

Estas ke ili ne havas iun ajn kaŝitan sencon.

Estas pli strange ol ĉiuj strangecoj

Kaj ol la revoj de ĉiuj poetoj

Kaj ol la pensoj de ĉiuj filozofoj,

Ke la aĵoj estas ĝuste kio ili ŝajnas esti

Kaj ekzistas nenio por esti komprenita.

Jes, jen kion miaj pensoj lernis sola:

La aĵoj ne havas signifon: ili havas ekziston.

La aĵoj estas la sola kaŝita senco de la aĵoj.

Fernando Pessoa - Portugalio (1888-1935)
Traduko: Roberto Passos Nogueira

POEZIO



KONTAKTO

La nova muzika erao

Morto de ko-disko, mp3 kaj la estonto de la Esperanta muziko

ROGENER PAVINSKI (BRAZILLO) KAJ CHUCK SMITH (USONO/GERMANIO)



Antaŭe simbolo de nova teknologia erao por la muzika industrio, la kompaktaj diskoj baldaŭ 30-jariĝos kaj ili tiel frue jam aspektas kiel maljunuloj. En la nova muzika mondo, kie la mp3-dosieroj fariĝis la nova komerca monero, la kompaktdiskoj nun ŝajnas senvaloraj aĵoj. Tamen, se oni povas diri ke la ko-diskoj pensiĝis, ili ankoraŭ ne mortis. Oni kulpigis la interreton kiel krimulon, la kaŭzanton de la krizo ĝuste pro tio ke ĝi ebligas interŝanĝi muzikon en la cifereca formato mp3. Sed nuntempe ĝi estas rigardata kiel la nura ebla solvo por la diskeldonejoj en ankoraŭ nebula estonteco.

De 2004 ĝis 2007 la disko-vendo pli ol duoniĝis en la tuta mondo kaj multaj eldonejoj, ĉefe la malgrandaj kaj sendependaj, fermiĝis. Sed kulpas ne nur interreto. Antaŭe, la eldonejoj simple ne havis konkurencon. La kompaktdiskoj estis la nura formato disponebla, kaj artistoj ne rajtas lanĉi la saman albumon per du malsamaj eldonejoj, tiel ke ili ne povas konkuri inter si pri kvalito kaj prezo de la disko. Konsumantoj ne havis multajn eblojn.

Sed nun la muzika merkato troviĝas en transira fazo, en kiu ĉiuj eldonejoj kaj artistoj devas adaptiĝi, malgraŭ ke neniu plene certas kiun vojon preni. Unu certeco tamen ŝajnas esti evidenta: Oni ne plu po-

vas eviti komerci muzikon per Interreto. Tiun decidon prenis ankaŭ la Esperanta diskeldonejo Vinilkosmo, tiel ke ekde julio 2009 nova servo ebligas elŝuti muzikojn kaj albumojn el la katalogo de Vinilkosmo.

Vinilkosmo fondiĝis en 1990 okaze de la lanĉo de 4-titola vinileto de la bandoj Rozmariaj Beboj kaj Amplifiki. De tiam, la franca eldonejo, regata kaj administrata de Floréal Martorell, motoro de la Esperantomuzika komunumo, eldonas, produktas kaj distribuas nur verkojn, ĉefe ko-diskojn, de Esperantaj artistoj kaj muzikgrupoj.

Tamen dum la lastaj jaroj, la fi-fama diskokrizo minacis ankaŭ Vinilkosmo-n kaj trudis al Martorell serĉi rimedon por ne fermi sian entreprenon: «Ni ne povis iri kontraŭ la fluo de la rapida teknika evoluo interreta kaj la petoj pli kaj pli insistaj de homoj por disponigi elŝuteblan muzikon. Tiam mi devis esplori la eblojn kaj elturniĝi, ĉar mi ne povis atendi sen ion fari vidante la disfalon de la diskovendoj», diras Martorell, pli konata kiel simple Flo en la Esperanta medio.

La unuaj provo tiusence estis ĉe la konataj retejoj, kiuj ofertis elŝutservon, kiel la fama iTunes. Sed iTunes postulas ke la oferto de la katalogoj de sendependaj eldonejoj devas funkcii tra iu peranto. Flo skribis al pluraj distribuantoj, el kiuj nur unu respondis ke lia katalogo ne interesas ilin, ĉar temas pri tro specifa

kaj margena muziko, kiu ne interesus sufiĉe grandan nombron da homoj. «Niaj vendoj estas ridindaj kaj por ili ne valoras elspezi tempon kaj monon por tiom malmulte», li aldonas.

Malfacila situacio. Ne restis alternativo krom memstare distribui sian katalogon per la reto, sed Flo eble ne atendis trovi oponanton ene de sia propra teamo. Mark Eaton, longtempa kunlaboranto, kiu starigis la unuan diskoservon de Vinilkosmo en la reto, rifuzis krei retejon por vendi mp3-dosierojn. «Por li krei elŝutejon ĉe Vinilkosmo estas rapidigi la morton de la KDisko, dronigi la eldonejon kaj kolapsigi la produktadon», asertas Martorell.

Kvankam Flo persone havis la saman konvinkon kiel Mark, li ne povis simple rezigni kaj alpreni la riskon. Decidiginte memlerni kiel krei retejon por la nova elŝutservo, li trovis firmaon kiu instruas kiel starigi interretajn paĝojn kun asistado, kaj tiel surbaze de Os Commerce



Afrika Kompilo, unu el la projektoj de Vinilkosmo

strukturo ekigis la stariglaboron, unue por krei Esperantan interfacon kaj sekve por ekenretigi la muzikmaterialon. "Tio daŭris 7 monatojn ĝis mi povis malfermi la retejon", li diras.

Malgraŭ la grandega laboro por konstrui kaj administri la retejon, Flo estas kontenta pro la 4-lingva interfaceto kaj pro eblo oferti elĉerpitajn diskojn kaj virtualajn albumojn. Li reliefigas ke ĝi estas laŭleĝa kaj respektas la aŭtorrajtojn. Por tio li pagas al la aŭtorrajta societo tiel ke la artistoj ricevu siajn aŭtorrajtajn tantiemojn.

Sed nun, post preskaŭ 2 jaroj ekde sia lanĉo, la nova elŭtservo tamen ne povis konvinki lin ke la reto estas la solvo por la diskokrizo, ĉar malgraŭ ĉiuj klopodoj la vendoj estas malaltaj. "Ni havas multajn vizitojn sed kiuj ne konkretigas

per elŭtoj. Ŝajnas al mi ke homoj serĉas senpagajn elŭtojn kaj ne pretas pagi. Eĉ pluraj tion klare diris al mi". Flo aldonas ke ekde junio 2010 la kostoj de la elŭtejo iĝis pli altaj ol la enspezoj. «Tio vere malkuraĝigis min. Mi multe laboris por atingi tiom malkontentigan rezulton», li bedaŭras.

«Laŭ la nuna stato, mi povas konfirmi ke la elŭtado tute ne povas kompensi la perdon de la diskodisfalo. Kaj neniam povus kovri produktokostojn de novaj albumoj eĉ se ni ne eldonus ilin surdiske», aldonas Flo. Eble Mark Eaton nun diras: «Nu, mi avertis...»

Malgraŭ ĉio, Flo ne rezignas. Fine de 2009 li aliĝis al CD1D (Federacio de Sendependaj Eldonejoj en



Flo, Martin Wiese kaj Ale Kosabela

Francio), kiu kunigas eldonejojn por alfronti la krizon kaj por trovi solvojn kaj rimedojn, starigante ilojn utilajn por ĉiuj sendependaj eldonejoj aniĝintaj al la federacio. En decembro 2010, CD1D reprezentas 200 eldonejojn el Francio sed ankaŭ Kanado, Belgio, Svislando kaj Britio, kun 1528 artistoj, 2255 albumoj kaj 15271 muzikaĵoj elŭteblaj.

La federacio disponigas al Vinilkosmo spacon en la sia elŭtejo kaj laŭ Martorell estas bona alternativo por Vinilkosmo, kiu firmigas la estonton en kazo de problemoj kun la du retejoj de Vinilkosmo. Li ankaŭ opinias ke CD1D estas grava por Vinilkosmo ĉar tiel ĝi havas oficialan malfermon al la ekstera mondo sed en specifa sendependa medio. «Tie povas trafi nin homoj kiuj estas pli malfermitaj ol normalaj konsumantoj, ĉar temas pri homoj kiuj interesiĝas pri la sendependa muziko. La sendependaj eldonejoj havas nenian komunan identecon kun komercindustriaj eldonejoj. Por la komercindustriaj eldonejoj ne gravas la kulturo nek



Diskoservo de Vinilkosmo dum internacia renkontiĝo en Katalunio



Diskoservo en Toulouse Plage dum FESTO 2010

la diverseco, al ili gravas vendi amasajn kvantojn da kiel eble plej famaj artistoj», li diras.

Sendependeco estas aparte grava por Martorell. Filo de kataluna anarkiisto, kiu ekziliĝis al Tuluzo en Francio post la malvenko en la Hispana enlanda milito, esperantistiĝis en 1987 kaj fondis EUROKKA-n, (TEJO-faka Esperanto-asocio pri Esperanto-muziko), la ne plu ekzistantan gazeton Rok-gazet' kaj kreis la Esperanto-muzikan eldonejon Vinilkosmo. Sed antaŭ ĉio, en 1980 en Donnevill, kie li loĝas apud Tuluzo, fondis ekzercejojn por la muzikgrupoj de la regiono. Tiu sama loko, fakte la kortego de lia propra domo, pasintjare servis kiel sidejo por FESTO, Franca junulara aranĝo, kiu tiam estis la plej muzika Esperanto-aranĝo ĝis nun, kun diversaj koncertoj de Esperanto-artistoj kaj de lokaj muzikgrupoj.

Pri la estonto de Vinilkosmo tamen la afero ne estas tiel festa. Pro la malmultaj enspezoj el vendado de diskoj kaj ciferecaj albumoj, apenaŭ estas planoj por produktado de novaj albumoj. Li opinias ke esperantistoj ne sufiĉe apogas la eldonejan agadon, ne diskonigante la elŝutservon. «Eble oni atendas ke Vinilkosmo malaperu por tiam interesiĝi pri ĝi kaj varbi sed tiam jam malfruos».



La 3a Kaj Tiel Plu aperis

Dum la grandaj eldonejoj planas ligi la vendon de muziko al aliaj produktoj, la malgrandaj apenaŭ provas travivi la periodon, kiu por Vinilkosmo, ankoraŭ pli malfacilas ĉar ĝi dependas de komunumo malgranda, kiu troviĝas dise en la mon-



Flo kaj Tribulet en la reĝisorejo

do. Fronte al ĉiuj malfacilaĵoj, kial daŭrigi? Kio movas lin? «Tutsimple Esperanto kaj pasio al Esperanto-muziko!», li senhezite asertas.

Tamen la ĝisnuna ekzisto de Vinilkosmo ŝuldiĝas al la fakto ke ĝi ne estas profitcela entrepreno. La enspezoj de Martorell venas de la provludejoj, kiujn li starigis kaj luigas al diversaj muzikgrupoj de la regiono. Tiel li utiligas la enspezojn de Vinilkosmo nur por novaj projektoj. «Se Vinilkosmo estus vere komerca diskeldonejo, jam de longe ĝi estus fermita», klarigas la eldonisto, kiu ankaŭ uzas eĉ enspezojn de la trinkejo, kiu servas al la ne-esperantistaj muzikistoj en la provludejoj por financi la eldonaĵojn de Vinilkosmo.

Bonŝance, Vinilkosmo estis kelkfoje rekonita pro sia grava kontribuo al la Esperanta kulturo kaj ricevis subtenon, kiel la Premio Deguĉi en 2009. Diversaj eldonaĵoj konkretiĝis nur danke al tiuj subtenaj monhelpoj, kiuj antaŭe jam venis de fondaĵoj FAME, Carson kaj de la Eŭropa Junulara Fonduso, kun helpo de TEJO.

La multjara – kaj ni povas eĉ diri – volontula agado de Martorell por Esperanto-muziko estas malfacile mezurebla. La esperantistaj muzikistoj rekonas kaj atestas tion: «Oni povas paroli serioze pri «Vinilkosma generacio »», diras Jean-Marc Leclercq, pli konata kiel JOMO. «Ĝi ankaŭ suprenpuŝis Esperanton ĝis nivelo de multaj aliaj lingvoj, kiuj

posedas siajn proprajn mediojn kiel vektoron de sia kulturo», li konkludas. Cyrille Poulet, kantisto de La Pafklik, reliefigas ke: «Vinilkosmo en sia katalogo havas albumojn tiel diversajn kiel la punk-hardkora «Esperanto Subgrunde», la franca bardmuzika «Jacques Yvart kantas Brassens» kaj hiphopa kompilo! Cetere per kreado de longviva eldonejo li vere vastigis la Esperanto-kulturon, kaj certe per sama okazo Esperantujon mem!»

La nun 21-jara diskeldonejo provas pluvivi en la nova muzikerao, kie preskaŭ ĉio kion oni lernis dum la pasintaj jardekoj, fariĝas malfacilaĵo por tiu medio. Ĉu Vinilkosmo plu ekzistos spite la malcertan futuron? La entuziasmo povas plu havi esperon pri la estonto, ĉar Flo estas vere malfacile venkebla. «Ja ne maleblas revii kaj havi celojn en la vivo. Antaŭ ĉio mi estas idealisto, tial mi pasie agas por Esperanto-muziko» kaj konkludas: «Mi esperas ke eblos dum ankoraŭ longa tempo eldoni Esperanto-muzikon sub kiu ajn formo.» Ni ankaŭ. ■

www.vinilkosmo.com
Vinilkosmo-retejo, kie konsultebas kaj haveblas ĉiuj disponeblaj produktoj.

www.vinilkosmo-mp3.com
Elŝut servo de cifereca muziko el la katalogo de Vinilkosmo.

<http://cdld.com/>
Federacio de Sendependaj Eldonejoj.



Leĝoj kontraŭ elŝutado ne helpas artistojn

ROGIER HUURMAN – DANIO

Tre ofte nuntempe oni aŭdas la kriojn de la muzik- kaj filmindustrioj: „kontraŭleĝa elŝutado mortigas la artojn!” kaj „se ni ne haltigas la elŝutadon, miloj da homoj perdos laboron!”. Kiel ĉiam kun tiaj panikaj krioj oni unue devas konscii, ke tiuj, kiuj krias ilin, havas bonajn kialojn por ŝajnigi la problemon pli granda ol ĝi vere estas. Sed tiu ĉi artikolo volas konvinki vin, ke tiuj krioj estas ne nur senkiale panikaj kaj troigaj, fakte la tuta malo estas vera: elŝutado, kaj la interreto ĝenerale, donas novajn eblojn kaj certe helpas al artistoj.

Unue devas malaperi la kredo 'kopii estas ŝteli', ĉar ĝi ne estas. La leĝa principo de posedo estas pli malnova ol leĝoj mem, kontraŭe la ideo de kopirajto ekzistas nur ekde la 18-a jarcento. Kaj ĝi ĉiam estis nur komerca rajto, kies misuzo neniam estis punbla per puna leĝo, nur per civila leĝo. Kaj komence ĝi validis nur por kelkaj jaroj. Sed influgrupoj de aŭtoroj, kaj poste ankaŭ de la novaj muzika kaj filma industrioj, sukcesis plilongigi la daŭron de kopirajto ĝis multaj jaroj post la morto de la originala verkinto. Laŭ la Berne-traktato minimume 50 jaroj post la morto, en Usono 90, kaj en la EU baldaŭ ankaŭ, se nuna leĝopropono akceptiĝos. Kaj la kopirajtaj grupoj provas movi misuzon de kopirajta verko de civila leĝo al puna leĝo, por ke ili ne plu mem bezonu procedi, sed jam tro okupataj justicaj instancoj tion faru por ili.

Unu grava danĝero de ĉio ĉi estas, ke novaj proponoj por protekti kopirajton malpli kaj malpli

respektas la konstituciajn rajtojn de la civitanoj. 'Elŝuta imposto' (imposto por malplenaj diskoj, muzikludiloj, aŭ eĉ por retkonekto) plialtigas sen necese la kostojn de libera parolo. Retfiltrilo aŭ kontrolo de retrafiko (ambaŭ proponitaj aŭ jam uzataj en multaj landoj) tute kontraŭas la rajton je privata kaj libera komunikado. Kaj la plej novaj leĝoj aŭ proponoj, ekzemple la franca Hadopi aŭ la proponata ACTA, devigas retservojn forpreni la retkonekton de uzantoj sen la interveno de juĝisto, kio evidente kontraŭas la rajton je justa procedo kaj la liberecon de komunikado.

Tiuj, kiuj fajfas pri civitanaj rajtoj, tamen diras, ke tiaj aferoj necesas por protekti la arton kaj la laboron en la industrio. Sed eĉ tio ne veras. Muziko kaj literaturo ekzistis jam longe antaŭ la ekesto de kopirajto, kaj la historio montras, ke ĉiu nova teknologio donis pli grandan profiton al artistoj; kiam venis la gramofono, muzikistoj timis, ke ili ne plu povos gajni monon per

koncertoj. Anstataŭe ili ekgajnis monon per vendado de diskoj. La alveno de la filmbendo timigis filmkreistojn: 'Nun certe neniu plu iros al kinejo!' Anstataŭe oni gajnis milionojn per vendado de bendoj. Kaj jam iTunes kaj aliaj sukcesas profitegi de interreta vendado de muziko.

Eble eĉ pli interese estas, ke pro la interreto nekonataj artistoj nun pli facile ol antaŭe povas trovi publikon kaj rekte gajni monon sen perdi la plejparton al eldonejo. Kaj ĉiuokaze muzikistoj jam delonge gajnas pli per koncertado ol per vendado de diskoj. Do ŝajnas, ke la nuraj malvenkantoj estas la grandaj eldonejoj, kiuj povas pagi multe por influi la politikon. Kaj eĉ se ili ne sukcesos haltigi elŝutadon, ĉar tion neniu leĝo aŭ procedo ĝis nun sukcesis, iliaj agadoj damaĝas niajn bazajn rajtojn kaj liberecojn. Do agadu, plendu kaj voĉdonu kontraŭ partioj, kiuj fordonas niajn rajtojn por protekti industrion, kiu ne bezonas protekton. ■

Konktakto enketis: Kiu estis la lasta fizika Ko-disko, kiun vi aĉetis? Kiam?



@FelipeQueirozBR - "La Porkoj" (KD-nomo: "Ŝako"), okaze de la Brazila Kongreso de Esperanto en Maceió-AL, 2004. Post tio, nur MP3 aŭdiĝis.



@paarne - Max Raabe & Palast Orchester: Heute Nacht oder nie. Kiel donacon, en januaro.



@FechjoCesarano - Mi daŭre aĉetadas la KD-ojn. La plej laste aĉetitaj estas la albumoj de la finna grupo Turisas. Antaŭ 2-3 monatoj.



#Suzanne Bolduc - Hieraŭ, mi vizitis du fizikajn brokantejoj kaj aĉetis tri fizikajn KD-ojn! Du KD-ojn de Omara Portuondo, kaj unu de tradicia muziko el Danio... kvazaŭ retrorigarde al la havana UK, kaj anticipe al la kopenhaga UK.



#Martin Wiese - Let England shake de PJ Harvey, antaŭ eble du monatoj.



#Manuela Ronco - "Brokantaĵoj" de Esperanto Desperado, en la libroservo de la pasinta PSKK



#Sergey Tyrin - Mi ne memoras... ;-)



Artefarita Intelektto

Kial komputiloj ne povas ĝin krei?

GREGORIO NAÇU - KANADO

La mallonga historio de komputila scienco komenciĝis nur post la dua mondmilito, kaj ekde tiam komputilaj sciencistoj revis kaj penis por fari komputilojn, kiuj havos homnivelelan inteligenton. Dum jardekoj tiu ĉi scienckampo estis regata de matematikistoj kiuj nur teoriis kiel igi la komputilojn de la estonteco simili homan intelekton. En la frua epoko de komputila teknologio la procezo rapida kaj la kvanto da memoro estis malgrandegaj. Ili povus nur teoriadi, ĉar tiamaj komputiloj simple ne havis sufiĉe da rimedoj por konkretigi iliajn ideojn.

En tiu periodo de teoriado multaj fundamentaj ideoj fiksiĝis en la mensoj de la fakuloj. Tiuj ideoj plejparte ne estis bazitaj sur la biologia realo de la cerbo de vivestaĵoj sed sur matematikaj konceptoj pri algoritma rendimento. Dum multaj jaroj, tiaj ideoj pri algoritmaj solvoj plene regis super ĉiu penso pri la problemoj solvendaj, tamen la komputila situacio ne permesis al ili esplori ĉu aŭ ne tiaj ideoj validas. La sciencistoj daŭrigis siajn esplorojn laŭ tiu direkto, ĉiel pensante ke la pli rapidaj komputiloj de la estonteco, ĉiam alian jaron for, magie fariĝos tiel inteligentaj kiel homoj. Fine la kruda kapacito de komputiloj kreskadis ĝis absurda nivelo de rapideco, miliardo-


jn da kalkuloj ĉiusekunde, dum la inteligento de komputiloj restis ridinde malalta. Ne nur la malnovaj fakuloj estis pruvitaj malpravaj sed, malpli bone por la monrimedoj de estontaj esploristoj, la ĝenerala publiko perdis sian intereson pri artefarita intelekto, ĉar ĝiaj promesoj neniam plenumiĝis.

Unu el la grandega amaso de la malfacilaĵoj pri la disvolvado de artefarita intelekto estas ke tiu postulas multfakan scion kaj lerton en unusolaj esploristoj: Vastan sciadon pri teknologio, komputila scienco, matematiko, biologio, cerba scienco kaj pli. Nur dum la pasintaj du jardekoj komputilaj sciencistoj komencis fokusi la studojn de la viva cerbo mem. Anstataŭ provi programi la simuladon de homaj kondutaj trajtoj, programistoj nun penas reprodukti la bazan funkciadon de la cerbo de bestoj. Komencante pri simplaj bestoj por lerni kiel ili funkcias, longan tempon antaŭ ol eĉ provi imiti la komplikon de la homa cerbo.

La unua problemoj kiu sin prezentas, estas ke homa scio pri tio kiel cerboj funkcias estas ankoraŭ tre limigita, kaj la scio ĝuste kiel ili funkcias estas kiel moviĝanta

celtabulo. La dua problemoj estas ke la studado de vivaj cerboj estas tre malfacila pro ilia kruta komplikego. Funkcio de cerbo nomiĝas neŭrono, pri kiu mi plu diskutos malsupre. La averaĝa homa cerbo pezas proksimume 1,5 kilogramojn, kaj en tiu relative malgranda spaco ĝi enhavas cent miliardojn (10^{11}) da neŭronoj! Ĉiu neŭrono havas sep mil ligojn al aliaj neŭronoj por fari astronomie grandan nombron da interligoj entute. Tiu estas proksimume unu miliono da miliardoj, 1.000.000.000.000.000, aŭ 10^{15} da interligoj. Eĉ la plej malkomplika besto, insekto aŭ vermo, havas diale malfacile malĉifreblan komplikon. La homa cerbo mem, por havi ian komparon, estas la unusola plej komplika aĵo pri kiu ni scias en la tuta universo.

Frue en la esploro de la funkciado de la cerbo oni malkovris ke ĝi estas vasta reto de et-etaĵoj nomataj neŭronoj. Ĉiu neŭrono mem estas malnaiva memstara vivaĵo. Ĉiu konsumas energion, ĉiu elirigas elĵetaĵon, kaj ĉiu maljuniĝas kaj mortas. Neŭrono havas kelkajn bazajn partojn, [tiu ĉi ne estas fakaj terminoj] korpon, unu elirtubon kaj multajn enirtubojn. La elirtubo disbranĉiĝas por fari ligojn al la enirtuboj de aliaj neŭronoj. Tiel ĉiu neŭrono ligas sin al multegaj aliaj neŭronoj, kaj kune ili formas tiel nomatan neŭronan reton. Informoj envenas la neŭronokorpon laŭ ties enirtuboj, kalkuloj estas farataj



Neŭrono-partoj

interne kaj energiaj mesaĝoj estas elirigataj laŭ la elirtubo, kiu sekve aktivigas (aŭ malaktivigas) aliajn neŭronojn. La magio, kaj la komplikoj, leviĝas el la specifaj detaloj kiel ĉiuj estas interligitaj, kaj ankaŭ kiel ili faras la kalkulojn en sia korpo. Mi ne priskribos la procezojn pli detale, ĉar ili nur pli kaj pli komplikiĝas de tie ĉi, kaj baza kompreno sufiĉas por kompreni la implicojn por la penoj de programistoj kaj aktualaj komputiloj.

Kelkaj aliaj faktoj pri la rilato inter cerbo, nervoj kaj la korpompartoj de la organismo sciindas. La nerva sistemo de organismo estas kompleksa etendaĵo de la neŭrona reto de la cerbo. Longegaj nervoĉeloj etendiĝas de ĉiu parto de besta korpo, kutime en fibra fasko kiu kuras protektite tra la spino, kaj ĉiu ligiĝas rekte al specifaj neŭronoj de la reto en la cerbo. Multaj tiaj nervoĉeloj kondukas informojn de la ekstera mondo en la cerbon, kaj la aliaj kondukas informojn alidirekte de la cerbo en la muskolojn por ebligi al la korpo moviĝi. Tiuj unuaj specoj konsistigas la sentumosistemon, inkluzive nian kapablon vidi, aŭdi, flari kaj pli. Estas grave kompreni tion kion faras la cerbo por la organismo. Ĉiu organismo havas ĉefan celon kiu estas travivi sufiĉe longe por reproduktiĝi. Ĝiaj duaj celoj rilatas kiel travivi kaj repro-

dukto: trovi manĝaĵojn, eviti manĝantojn, trovi aliseksan parulon, trovi ŝirmilon, ktp. La rolo de la cerbo do estas integri ĉiun informon de la senso-nervoj, traduki ilin en sencoplenan bildon de la ĉirkaŭaĵoj kaj elekti el la ebloj tiujn kiuj estas fa-


reblaj per muskoloj por igi la organismon atingi sian celon. Ĉiu vivanta organismo sekvas tiun bazan ŝablonon, kaj konsekvence ĉiu vivaĵa cerbo rolas fundamente same. La ĉerpinda koncepto estas ke cerbo ĉiam estas ilo kiu ebligas al celorientita organismo atingi sian celon.

La unua malfacilaĵo por komputiloj kaj por programistoj de artefarita intelekto estas, simplege, ke komputiloj ne estas celorientitaj organismoj. Efektive ili havas neniajn ambiciojn. Tiu ĉi estas pli tikla problemoj ol oni kutime unue plenkomprenas. Do, la programisto ne nur havas la problemon desegni neŭronoretan sistemon, sed eĉ pli malfacile li devas elturni artefaritan virtualan medion en kiu lia programo povas havi spertojn kaj en kiu lia programo devas renkonti problemojn kiujn ĝi povas superi, kaj en kiu ĝi devas havi motivojn por preferi sukceson super malsukceso. En la naturo evoluado enpuŝis tiujn motivojn per mondskala konkurso inter multimiliardoj da organismoj kiuj de generacio ĝis generacio povas havi malgrandajn ŝanĝojn, kie el malhelpaj ŝanĝoj eble rezultus la morto de tiu organismo. Kaj hodiaŭ programistoj estas petitaj enmeti tiajn motivojn en virtualan organismon kiu efektive ne loĝas en konkurseca medio, ne havas limigitajn rimedojn por kiuj ĝi devas lukti por havi, kaj kiu nek evoluas nek reproduktas sin. En la reala mondo, inteligento estas kvalito de organismoj kiuj estas alfrontataj de realaj problemoj, kaj do inteligento vere ne estas ĝenerala, kiel estis supozate de la teoriistoj de antaŭaj jardekoj. Ĝi ĉiam ekzistas enkadre de realaj celoj kaj realaj limoj.

La dua malfacilaĵo estas iom malpli filozofia, kaj multe pli fizika. Memoru kiaj estas neŭronoj. Unuope ili estas simplaj kaj povas fari nur simplajn kalkulojn je la datumoj kiuj envenas laŭ iliaj eniruboj. Sed samtempe, kaj pli grave, ili agas kaj respondas memstare. Tio signifas ke en iu ajn momento preskaŭ nekompreneble grandega nombro da neŭronoj povas esti kalkulantaj

samtempe, kaj sendepende unu de la aliaj. Oni estas tentata kompari tion ĉi konduton kun paralelaj procezentaj komputiloj, sed tio estas tre malpreciza komparo. Anstataŭe, pensu pri la jena ekzemplo de la kvalitoj kaj kondutoj de la homa cerbo kaj nerva sistemo. En la homa mano estas du mil kvincent nervofinoj sub ĉiu kvadrata centimetro de la haŭto. Kiam oni metas sian manon sur surfacon, tuj dekoj da miloj da nervoj sendas informojn samtempe al apartaj neŭronoj en la cerbo, kaj tiuj neŭronoj ĉiuj komencas integri la informojn, rapide plivastigante la nombron da samtempe uzotaj neŭronoj por atingi rekonon de la tuŝita substanco, dume neniam tiu ĉi interrompas ke la cetero de la tuta korpo estu prizorgata samtempe per aliaj cerbopartoj. La nuda fakto estas ke kompare en komputilo ĉio estas strikte konsekvenca. Oni pensas ke komputiloj alproksimiĝas al la maniero kiel cerboj funkcias, ĉar nun anstataŭ unu procezo ni havas du aŭ kvar aŭ en la plej grandaj superkomputiloj en la mondo eble kelkajn milojn. La homa cerbo uzas kelkajn milojn da paralelaj procezoj por prizorgi la haŭton sur la pinto de unu el viaj etfingroj. Por ke sinsekvaj komputiloj simulu la vastegan paralelecon de la neŭronreto en cerbo tiaj komputiloj devos esti pli rapidaj ol ni nun povas imagi.

Mi ne sugestas ke komputiloj kiuj funkcias simile al neŭronaj retoj por ĉiam estas neatingeblaj, nur ke la nuna arĥitekturo de procezoj estas fundamente malsama ol kiel intelligentaj cerboj funkcias. Neniom da lertaj algoritmoj povos superi tiajn bazajn arĥitekturajn malsimilojn. En la intertempo ni povas krei nur simulojn de paralelaj neŭronretoj por eksperimenti pri la bazaj principoj. Ĉu povas esti ke la komplekseco de nia cerbo estas fundamente tro granda por ke aliaj cerboj ĝin malĉifru? Se iam ni malkovros kiel la aranĝo de neŭronoj ebligas niajn plej intimajn psikologiajn kaj emociajn sentojn, ĉu ni tiam estos kiel Dio? ■



La ĉokolada kuketo

STEN JOHANSSON - SVEDIO

Mi ĉiam perdas ĉion. Ĉiam mi malhavas ion gravan. Eble mi povus perdi eĉ la kapon. Ĉi tiun fojon mi perdas laboron, bonan laboron, pro peco de kuketo. Mi ricevis laboron kiel sekretariino de ĉefo en la urba malsanulejo. Ĉio estas jam preta, oni diras. Mi devas nur veni duan fojon por viziti la ĉefon mem. Unuafoje li estis for kaj ne povis renkonti min.



Je la deka horo kaj duono mi devas alveni tien. Kutime mi ĉiam malfruas, sed je ĉi tiu grava okazo mi havas tro da tempo por la irado. Do mi devas atendi duonan horon en la malsanulejo. Mi decidas

trinki tason da kafo en la kafejo ĉe la ĉefa pordo. Kun la kafo mi aĉetas ĉokoladan kuketon.

La kafejo estas plena de atendantoj. Tamen mi trovas liberan tablon, kie mi metas mian kafon. Kompreneble mi lasis mian mansaketon ĉe la kaso kaj devas reiri por preni ĝin. Feliĉe neniu fiulo jam ŝtelis ĝin.

Mi revenas kaj vidas, ke maljuna eksterlandano kun grizaj haroj prenis lokon ĉe mia tablo. Nu ja, nenio direbla; ĉe ĉiuj tabloj sidas iu. Mi prenas mian kuketon. Tiam mi tamen tre surpriziĝas. En la kuketo estas bela spuro de dentoj. Mankas al ĝi unu peco. Kaj mi scias, kie estas tiu peco. Antaŭ la maljunulo staras taso da kafo kaj nenio plu. Tamen mi klare vidas lin maĉi kaj gluti ion. Li ankaŭ rigardas mian kuketon kaj

videble ruĝiĝas. Nu, li vere havas kialon ruĝiĝi!

Feliĉe, mi ne timas bakteriojn. Do mi decidas ne permesi al tiu aĉa fremdulo ĝeni mian trankvilon. Kun ŝajna ĝuo mi manĝas la reston de mia ĉokolada kuketo. La kafon mi vere ĝuas. Dume la viraĉo plu rigardaĉas min. "Eble vi kutimas ŝteli", mi pensas, "sed en mia lando vi ne plu faros tion!"

Fine li foriras, kiel hundo kiun mi batis. Sed ĉu li revenas? Jes, li revenas kun propra ĉokolada kuketo. Ĉi-foje li do aĉetis ĝin, ne ŝtelis ĝin. "Bone", mi ridetas al li, "do vi lernas". Li metas sian kuketon antaŭ si kaj ektrinkas sian kafon. Tiam bona ideo kaptas min. "Okulon pro okulo, denton pro dento", diras la Biblio, ĉu

ne? Mi rapide prenas lian kuketon kaj mordas unu pecon el ĝi. Mi ĝuas tiun pecon kaj remetas la reston antaŭ lin. Poste mi sidas trankvile sur la simpla seĝo. Mi rigardas la fremdan viron kun rideto. Tiam li vere foriras. Sendube li komprenas, kiu hejmas ĉi tie. Li lasas siajn kuketon kaj kafon.

Tiam mi vidas, ke estas tempo iri al mia estonta laborejo por renkonti la ĉefon. Facile mi trovas la lokon. Tie mi devas plu atendi dek minutojn antaŭ la pordo de la ĉefo. Mi provas elparoli lian nomon, kiu estas de fremda deveno.

Fine mi povas iri en lian ĉambron. Li mem ne estas tie, do mi eksidas por plu atendi. Mi metas mian mantelon sur la seĝon. Tiam io falas el ĝia granda poŝo. Falas ĉokolada kuketo! Ĝi estas mia kuketo, do tiu kuketo, kiun mi aĉetis en la kafejo. Sendube ĝi falis en la poŝon, kiam mi portis mian kafon al la kafeja tablo, sed tiam mi ne vidis tion. Mi rigardas ĝin kaj vidas, ke neniu mordis ĝin.

Ĝuste tiam venas la ĉefo, enmigrinto kun grizaj haroj. Li eble plu pensas kun bedaŭro pri siaj du ĉokoladaj kuketoj, el kiuj li povis manĝi nur unu solan pecon. ■

sekretario: oficisto por korespondado, protokolado
taso: trinkujo sufiĉe malalta, kun larĝa malfermaĵo, ofte kun tenilo
ĉokolado: dolĉaĵo el kakao kaj sukero
trovi: ekvidi, ekrimarki (post serĉado)
kaso: monkesto; monrimedoj, monhavo
surprizi: veni aŭ fari ion neatendite; mirigi per io neatendita; mirigi, ĉar neatendita
spuro: postsigno
maĉi: dispremi en la buŝo per la dentoj
gluti: traigi el buŝo tra gorĝo al stomako
bakterio: unuĉela vivaĵo, kiu reproduktiĝas per duportiĝo
ĝeni: (iom) malhelpi al iu
ĝui: senti grandan plezuron; ricevi plezuron/utilon de io
Biblio: sankta libro de kristanoj
mordi: premi per la (antaŭaj, tranĉaj) dentoj
mantelo: longa vesto kun aŭ sen manikoj, kovranta la aliajn vestojn
migri: iri de unu loĝloko al alia (malproksima) loko, por ekloĝi tie
bedaŭri: diri aŭ tpeni: "estas malbone, ke tio okazis tiel"

Teksto el la retejo Facila Vento: <http://facila.org/>
 Permesilo CC BY-NC 3.0



Ĉinaj Freskoj

CHEN JI - ĈINIO

La antikvaj ĉinaj freskoj klasifiĝas en kvar grupojn: la hala, hipogea, kaverna kaj templa.

Hala fresko troviĝis ĉefe sur muroj de grandaj konstruaĵoj de imperiestroj kaj princaj palacoj. Historiaj notoj registris, ke jam en la Zhou-dinastio (9-a - 3-a jc. a.K.) aperis en palaco fresko pri la meritoj kaj virto de la reganto de Zhou. Sed la antikvaj konstruaĵoj ĉefe el ligno facile difektiĝis, kaj malmultaj el ili konserviĝis ĝis nun. En la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento ĉinaj arkeologoj trovis, en la ruino de Xianyang, la ĉefurbo de la Qin-dinastio (221-206 a.K.), en la nuna Ŝaanxi-provinco, kolorriĉajn fragmentojn de palaĉa fresko pri veturilo, rajdanto, konstruaĵo kaj ornamaj desegnoj. Per tiuj freskaj fragmentoj oni povas imagi la luksecon kaj imponecon de la palaco de la Qin-dinastio.

Hipogea fresko. Ofte la muroj de hipogeoj de imperiestroj kaj korteganoj estis ornamitaj per freskoj por montri la dignon kaj rangon de la mortinto.

En la hipogeo de la geedzoj Bu Qianqiu de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. - 22 p.K.) en Luoyang la fresko prezentas la leviĝon de la mortinto al la ĉielo. La mastrino sur fenikso kaj la mastro kun pafarko sur drako, akompanate de feoj kaj feinoj, flugas sur la ĉielo inter nuboj.

La strekoj de la fresko estas variaj en tuĉado kaj riĉaj je esprimo.

La fresko en la hipogeo de la aristokrato Lou Rui de la Norda Qidinastio (550-577) en Taiyuan de provinco Ŝanxi estas unu el la gravaj novaj eltrovoj de la ĉina belarta arkeologio. La fresko montras la vivon de la aristokrato per alta pentra arto.

La freskoj en la hipogeoj de princoj de Tang-dinastio (618-907) estas grandaj kaj enhavoriĉaj. Tiuj delikataj freskoj plene montras la prosperon de la Tang-dinastio.

Kaverna fresko. Por memkulturigi kaj okazigi religiajn ritojn, budhistoj fosis kavernojn sur montoj, skulptis ene budhojn kaj faris freskojn.

La plej famaj kavernaj freskoj de Ĉinio troviĝas en la Mogao-kavernaro en Dunhuang de la Gansu-provinco. La kavernaro sidas sur la orienta parto de la antikva Silka Vojo. En la kvara jarcento la bonzo Yue Zun fosis la unuan kavernon ĉe la piedo de la monto Sanwei en Dunhuang. Kaj en la Tang-dinastio la nombro de la kavernoj kreskis ĝis mil. Nun konserviĝas 496 kavernoj de diversaj dinastioj, kaj la totala areo de la freskoj superas 45 000 kvadratajn metrojn. Tiuj freskoj prezentas budhismajn rakontojn, muzikilludadon, flugantajn feinojn, mecenatojn por kaverno-fosado kaj diversajn desegnojn.

Templa fresko. Preskaŭ en ĉiuj temploj de Ĉinio troviĝas freskoj de religiaj temoj. Freskoj en tiu kategorio ĝenerale estas grandaj kaj delikate faritaj. La freskoj heredis la tradicion homfiguran pentraton de la Tang- kaj Song-dinastioj kaj estas altvaloraj en arto.

En la templo Yongle de Ruiĉeng de la Ŝanxi-provinco, la ĉina taoisma sanktejo, preskaŭ ĉiuj muroj de la haloj estas kovritaj per freskoj perfekte konservataj, el kiuj la plej fama estas "Kulto al la Sanktulo" en la halo Sanqing. La fresko prezentas pli ol 280 diojn de la taoismo en 4-5 vicoj. La strekoj de la figuroj estas fortaj kaj fluaj, kaj 2-3-metraj strekoj de vestofaldoj estis unutire plenumitaj. Oni faris la freskon ĉefe per bluverda koloro, la konturoj estas klaraj kaj dense farbitaj. La fresko estas majstraĵo en la historio de la ĉina pikturo.

La antikvaj ĉinaj freskoj estas konsistiga parto de la antikva ĉina piktura historio kaj valoraj artaj heredaĵoj. Tiuj delikataj freskoj spegulas en certa grado la statojn de la politiko, ekonomio, militaj aferoj kaj kulturo de diversaj historiaj periodoj de Ĉinio kaj havas gravan historian valoron.

Prosperas ankaŭ la modernaj freskoj en Ĉinio. La ĉinaj freskistoj kreis multajn ĉin-stilajn freskojn por modernaj konstruaĵoj kaj placoj en diversaj lokoj de la lando. Heredinte la ecojn de tradiciaj ĉinaj freskoj, ili asimilis tiujn bonajn de eksterlandaj freskoj.

Ili uzas tradicion delikatan pentradon, orumadon kaj novajn materialojn, kiaj akrila farbo, lako kaj lana teksaĵo. Ankaŭ la temoj fariĝas pli kaj pli diversaj, kiel historia okazaĵo, antikva mito, pitoreskejo kaj moderna vivo. ■



Kunlabore kun El Popola Ĉinio

<http://www.espero.com.cn/>

Mileștj Mičj

La plej granda subtera urbo en la mondo

VASILE GAVRILAN - MOLDAVIO



Moldavio estas landeto kun ĉirkaŭ tri milionoj da loĝantoj situanta en la sud-orienta parto de Eŭropo, inter Rumanio kaj Ukrainio. Ĝi estas tre malmulte konata de eŭropanoj kaj preskaŭ nekonata de aliuloj.

Unu el la plej gravaj metioj de moldavianoj estas vit-kulturo (vinber-kulturo) suprenigata eĉ al rango de tradicio, konservata dum jaromiloj. La maljunuloj asertas ke la veran moldavianon oni povas rekoni nur laŭ lia vino, kiun li mem hejm-produktas ĉiu-jare. Mirinde, ke eĉ la mapo de tiu ĉi landeto similas al vinbero!

La subtera imperio

Mileștj Mičj (Mileștii Mici) estas unu el la plej allogaj vidindaĵoj, kiujn havas la moldavia turismo. Ĝi estas vilaĝeto kun ĉirkaŭ 3,5 mil loĝantoj situanta 20 km for de la ĉefurbo Kiŝinaŭ. Sed la grandan famon alportis tio, kio estas sub la vilaĝo.

Tiu "subtera imperio" estiĝis en 1969 ene de la grotoj, kiujn fosis la loka ŝton-ministaro. Oni konstatis ke tie ĉi, inter 40-85 metrojn profunde subteren sumiĝas la plej idealaj kondiĉoj bezonataj por vin-konservado: humideco – 85-95%, konstanta temperaturo – inter 12-14 gradoj. La vin-urbo subtera estas tiom vastega ke sur ĝiaj stratoj la turistoj povas vagadi rekte per aŭtobuso. La stratoj mem kondukas al la ĉefurbo Kiŝinaŭ, sumiĝantaj je ĉirkaŭ 200 km, el kiuj nur ĉirkaŭ 55 km estas uzataj. Miloj kaj miloj da kverkaj grandegaj bareloj – po 20.000 litroj

– liniigas ambaŭflanke de la galerioj kiel sindonaj soldatoj.

La stratoj de tiu ĉi subtera urbo havas nomojn de ĉiuj specoj de mond-famaj aŭ lokaj vinoj – str. Sauvignon, str. Cabernet, str. Muscat, str. Feteasca ktp.

La plej granda vinaro el la mondo

La vinoj de Mileștj Mičj estas produktataj konforme kun la loka malnova moldavia tradicio, sankte konservata. Post la grand-nombra ĉiu-jara produktado, la vinoj maturiĝas dum jardekoj en la silento kaj duonlumo de la subtero. Ju pli la vino maljuniĝas, des pli ĝia valoro kreskas. La plej malnova botelo datumas de la jaro 1968 kaj oni povas ĝin aĉeti nur kontraŭ pli ol 2 mil eŭroj. En 2005 Guinness World Records deklaris oficiale ke Mileștj Mičj estas la plej granda vinaro el la mondo. En tiu jaro sumiĝis ĉirkaŭ 1,5 milionoj da vin-boteloj, nuntempe la cifero superas 2 milionojn.

La vino preferata de la Angla Reĝino

Oni diras ke ĉiu-vespere, post la vespermanĝo, la reĝino de Granda Britio ĝuas glason da ruĝa vino de «Ora Aro» el Mileștj Mičj. Tiu nobla



Strato de la subtera urbo



Vinmaturiĝo en la silento de la subtero



Viktoro SOLÉ- Katalunio

Blogo de lingvolernanto

vino nomiĝas «Negru de Purcari» kaj ĝi neniam finiĝas en la kelo de la Reĝa Domo. Sed la nobleco de Mileŝtij Miĉj konsistas ne nur el la simpatio de la brita reĝino. Tien ĉi venas la plej gravaj prezidantoj, regnestroj, politikistoj kaj financ-gravuloj, kiuj vizitas Moldavion.

La prezidantoj de Rusio, Rumanio, Ukrainio kaj aliaj eŭropaj ĉefestroj (kaj ne nur) kutime aperas en la silenta vilaĝeto. Ĝenerale ĉiuj famuloj devas nepre viziti kaj gustumi la vinon de Mileŝtij Miĉj – al tio multe kontribuas la fakto ke la loko situas apud la flug-haveno de la ĉefurbo.

Mileŝtij Miĉj allogas ĉiu-jare ĉirkaŭ 22 mil vizitantojn el la tuta Eŭropo kaj tiu cifero konstante kreskas. Menciindas ankaŭ ke, krom la produktado de la vino, la vilaĝo produktas altkvalitan ĉampanon – Moldavio ja estas unu el la malmultaj landoj el la mondo, kiuj gajnis de Francio la licencon produkti originalan ĉampanon laŭ la recepto de Dom Perignon, la patro de tiu fama drinkaĵo.

Finfine oni diras ke la bukedo kaj gusto de la vino de Mileŝtij Miĉj rakontas pri la popolaj trajtoj de moldavianoj. Do venu kaj gustumu la moldavian etoson! ■

—Ĉu vi komprenas kiel komputilo funkcias?

—Nu, pli-malpli...

—Bone, vi scias, ke ĝi havas malmolan diskon kun finia memora kapacito...

—Jes, kompreneble...

—Kaj, kio okazas kiam la disko estas tutplena?

—Nu, la komputilo malrapide funkcias kaj krome, oni povas enmeti nenion se antaŭe oni ne viŝas ion ajn...

Tiamaniere iris la parolado kun la doktoro. Mi dankas, ke li estis sufiĉe klara: laŭ lia diagnozo mia cerbo similas al preskaŭ plenplena malmola disko de komputilo.

Ĉio komenciĝis, kiam mi avertis, ke mi forgesas etajn aferojn. Unue, temis pri malgravaĵoj. Ŝajnas al mi, ke ĉiu homo havas tiajn forgesadojn: ĉu vi ne troviĝis en la kuirejo de via hejmo kaj, tiam, ne povis memori la kialon? Ĉu vi iam ne forgesis la nomon de konatulo?

En ĝeneralaj vortoj, tio ne estas tro zorgiga, sed por mi, tre ordema homo, ja estis. Mi kapablis mense kontroli amason da aferoj sen la helpo de agendo, ĉu papera, ĉu komputila. Fakte, antaŭ kelkaj jaroj mi parkeris amason da telefonnumeroj, sed nuntempe, per la novaj poŝtelefonoj, oni jam ne plu bezonas okupi sian cerbon pri tio.

Aliflanke, mi estas instruisto kaj devas enkapigi la nomojn de miaj lernantoj. Mi taksas kiel gravan pekon forgesi nomon de lernanto: "forgesi la nomon, forgesi la homon". Tamen, post la unuaj negravaj forgesaĵoj, mi ekkomencis forgesi pli seriozajn aferojn: antaŭ nelonge mi foriris, hejme lasante la kuirilon ŝaltita, la pasintan semajnon mi forgesis mian sekretan numeron por eltiri monon el aŭtomata

banko. Vidante tion, mi skribis miajn retpaĝajn pasvortojn en bone kaŝitan dokumenton, sed nun jam ne memoras kien mi metis ĝin.

Aldone, mi tre ŝatas lingvojn, kaj nun, se mi bone memoras, mi lernas tri lingvojn samtempe, do mi bezonas multe laborigi mian cerbon. Eble ĝi jam multe suferis pro la neracia kvanto de "phrasal verbs", pro la arbitra ortografio kaj de la angla, kaj de la franca, pro mil reguloj kaj du mil esceptoj, pro la transitiveco aŭ netransitiveco de la Esperantaj verboj... Do, laŭ la doktoro, la problemo estas, ke mia cerbo ne povas akcepti pli da datumoj. Se mi klopodas enmeti iun ajn novaĵon, same kiel la komputilo, kelkaj gravaj aŭ negravaj informoj hazarde malaperos.

Nun mi devas decidi, ĉu mi preferas finfine enkapigi, kiel funkcias la Esperantaj finaĵoj -ita, -ata, -ota, -inta, -anta, -onta, aŭ ne forgesi la nomon, ekzemple, de mia bopatrino. Dilemo, ĉu ne?



Saluton!!!

Venas nova eldono de TEJO-Tutmonde. Unue mi volas peti pardonon de ĉiuj, kiuj provis kontakti min, sed mi ne respondadis. La ĉefa kialo estis mia ŝtatekzameno, ĉe kiu mi bonŝance sukcesis. Dankon por via pacienco! Nu, jen al ĉi-eldono:

Dumpaske en Italio okazis Internacia Junulara Festivalo. Dum ĝi estiĝis nova tradicio – Piso de Pepo. Pri ĝi rakontos en la intervjuo unu el ĝiaj fondintoj Sergey Tyrin.

Ĉu vi scias, kio estas ĈeSKEJ? Ĝia historie unua renkontiĝo pasis aprile en Slovakio. Por TEJO-Tutmonde raportis pri ĝi Miroslav Hruška.

Ĉu vi konas bone Hungaron? Petra Smidéliusz malkovros al ni 15 interesaĵojn pri la lando kaj ĝia lingvo. Memkompreneble, unu el la interesaĵoj estas.... Nu, legu mem.


Song Ho-young invitos nin al Komuna Seminario, kiu okazos

oktobre en Koreio.

Kaj se vi ŝatas Esperanton kaj volas ekscii pri ĝi multe, kial do ne studi ĝin! Allogos vin Szabolcs Szilva.

Mi esperas, ke kun plezuro vi tralegos niajn paĝojn. Mi emfazas, ke TEJO-Tutmonde estas precipe via gazeto. Vi kreas la Esperantan komunumon. Vi do ankaŭ povas krei la enhavon de TT. Se vi volas kontribui regule (kaj eble iam iĝi eĉ redaktoro de TT), aliĝu al la teamo de kontribuantoj. Informojn – kaj aktualajn artikolojn – vi trovos ĉe nia blogo: <http://www.tejo.org/eo/blog/8543>. Kaze de iuj ajn demandoj, ne hezitu kontakti nin ĉe tejo-tutmonde@tejo.org.

Agrablan legadon! Dan.



La unua kaj mojosa. ĈeSKEJ!

MIROSLAV HRUŠKA - Ĉeĥio

Kies renkontiĝo? Ĉu vi diris deĈeSKEJ? Tio sonas mojose! Sed daŭre mi ne scias, pri kio temas. Do, dum la jaro 2009 aŭtune oni kreis neformalan organizon ĈeSKEJ, kiu, kiel jam direktas la nomo, konektas du memstarajn organizojn: Ĉeĥan Esperanto-Junularon (do ĈEJ) kaj Slovakian Esperantan Junularon (SKEJ).

La renkontiĝo en Plevník-Drienove okazis de la 15-a aprilo ĝis la 17-a de aprilo. Kiam ni vendrede vespere atingis la urbeton, ni timis, ke ni devos longe serĉi la renkontiĝejon. Sed niaj timoj estis superflujaj. Jam ĉe la trajno atendis nin, la ĉeĥan grupon, Indrě, Lubo kaj Juraj. Post 15 minutoj ni venis al la domo numero 105, kie situas la arkivo de SKEF (Slovakia Esperanta Federacio) kaj kie jam estis la ceteraj, kiuj venis pli frue. La unuan vesperon ni nur iomete manĝis kaj decidiĝis, kie kiu dormos. Je la kvina horo matene venos grupo de tri homoj el Pollando, mi mem proponis, ke mi iru al la stacidomo por ili. Ankaŭ ekhejti la fornon kaj ekdormi!

Miaj vekilo en la poŝtelefono kaj vekilo en la kapo vekis min frue matene – je la kvara horo kaj duono kaj mi volis iri al la stacidomo por bonvenigi la polojn. Sed, ilia trajno estis malfruiĝinta kaj ili sendis al mi mesaĝon, ke ili venos je la sesa horo. Kaj en sms estas anstataŭ tri subskriboj kvin subskriboj. Mi ete timis, ĉu ni ĉiuj havos lokon, sed espereble supre estos sufiĉe da spaco. Do, je la sesa mi iris al la stacidomo. Ni salutis unu la alian kaj revenis kompreneble al la arkivejo.

Ĉirkaŭ la oka ni trankvile vekiĝis kaj preparis matenmanĝon. Dum la poloj ankoraŭ dormis, ni jam eklaboris :-). Kaj estis multaj farindaĵoj. Kiu volis, povis dehaki lignon, aliaj povis klasifiki dokumentojn kaj librojn. Plej multe da laboro estis supre subtegmente, kie ni klasifikis fakan literaturon laŭ aboco. Ni malkovris foje vere interesajn verkojn. Oftaj estis diversaj manifestoj, tradukoj de Gorbaĉev, listo de seksaj pozicioj aŭ verkoj, kiel zorgi pri abelkestoj.

Dum la tago alvenadis pliaj partoprenantoj kaj posttagmeze ni ekis promeni al Manínská tiesnava (valo inter rokoj). Inter la partoprenantoj de la promeno estis ankaŭ dank' al la komuna lingvo Esperanto amikeca atmosfero kaj ni baldaŭ ekamikiĝis kaj pridiskutis multajn temojn, inkluzive langropilojn, Esperantan agadon ktp. De la promeno ni revenis agrable malsatiĝintaj, jam estis tempo por malfrua tagmanĝo.

Dum la posttagmezo ni faris ankaŭ komunan foton de

ĉiuj partoprenantoj, bedaŭrinde en tiu ĉi momento for estis niaj geamikoj el Pollando. Ni ankaŭ enskribis en kronikon. Sume 21 partoprenantojn mi taksas kiel tre favoran nombron.

Vespere, kiam ni jam ne volis tiom labori (ŝajne inspiris nin la aŭto de Petro Baláž, kiu komence ne volis starti), ni iris ĉiuj el la arkivejo al unu el la lokaj restoracioj. Favorajn prezojn uzis ĉiu laŭ propra volo, iu krom biero aŭ limonado havis panon kun panŝmiraĵo aŭ parfeon. La grupeto el Pollando ja foriris dormi pli frue, ili volis dimanĉe forveturi je la kvina horo al Ĉeĥio kaj dum la vojo ankoraŭ rigardi la urbon Ostrava.

La resto el ni babilis pli longe kaj post la reveno al la arkivejo ni daŭrigis en bonhumora babilado.

Dimanĉo estis destinita ĉefe por la forveturado hejmen. Je la kvina horo forveturis do la pola grupo, je la sepa grupo al Prago. Ni pakis, matenmanĝis kaj finis la laboron supre en la arkivejo.

Kune kun Juraj, KuboF kaj Ŝeby mi finfine forveturas je la unua horo al Považská Bystrica, kie ni adiaŭas Juraj, kiu vojaĝas al Bratislava, la resto el ni al Ĉeĥio. Ankoraŭ aĉeti transliman biletan, kaj ek al Ĉeĥio!

La unua renkontiĝo de ĈeSKEJ finiĝis. Ĝi estis vere bona, tiom grandan nombron de la partoprenantoj neniu atendis. Mi jam do antaŭĝojas pri la venonta renkontiĝo de ĈeSKEJ kaj plia kunlaboro inter ĉeĥaj kaj slovakaj junaj esperantistoj!

(Fotaro: <http://www.facebook.com/media/set/?set=a.1511198160119.56980.1839351643>)



Ĉu vi volas esti informata aktuale?

Jen por vi ekzistas blogo de TEJO Tutmonde ĉe www.tejo.org. Ĝia adreso estas: <http://www.tejo.org/eo/blog/8543> Tie vi trovos la plej aktualajn informojn pri junulara agado tutmonde!

Trinkebla piso

Dum la ĉi-jara Internacia Junulara Festivalo, kiu okazis ekde la 20a ĝis la 26a de aprilo 2011, estiĝis nova tradicio. Dum Esperanto-renkontiĝoj oni povos trinki pison. Maskoto de TEJO estas la papago Pepo – kaj ĝuste ĝia estas la piso. Inventis ĝin estraranoj de TEJO kaj unu el ili estis la kasisto de TEJO Sergey Tyrin el Israelo.

Kia estis via opinio la ĉi-jara IJF?

Mi ĉeestis nur parte efektive, ĉar pli-malpli duonon mi pasigis en la ĉambro de Lukasz estrar-kunsidante, sed la vesperaj koncertoj estis mojosaj. Kaj en-programaj kaj gufujaj. Evidente, la programaj koncertoj estis sufiĉe allogaj, ĉar la partoprenantoj estis pretaj aŭskulti ilin ekstere, en la frosto, kvankam la koncerto de JoMo (kiel ĉiam) estis tre energia kaj li scipovis (kiel kutime) varmigi ĉiujn per gajaj dancigaj kantoj, dum 3 horoj pli-malpli.

Kaj post la koncertoj oni povis viziti drinkejon, ĉu ne? :)

Jes, kompreneble. Kvankam ĝis la vespero kiam TEJO estris ĝin, estis sufiĉe enue. Krom kiam venis policista kontrolo.

Do eĉ aventura la drinkejo estis! Ĉu la policanoj estis kontentaj?

Ili rimarkis nenion kontraŭleĝan, do problemojn la organizantoj pri la drinkejo ne havis.

Bonŝance! Ĉar la ĉi-jara drinkejo estis iom eksterordinara, ĉu ne?

TEJO aldonis al ĝi specialan guston. Dum la vespero kiam la estraranoj (kaj la ĉarma volontulino) prizorgis ĝin, oni ne nur povis aliĝi senpage al TEJO gajnante en botel-ludaj konkursoj, kaj ne nur plej intime informiĝi pri la IJK en Ukrainio, sed ankaŭ gustumi ekzotikajn, ekskluzivajn menuerojn. Ekzemple, la verdan (kompreneble!) drinkaĵon "Piso de Pepo", kiu, ni esperas, fariĝos tradicio de Esperantaj drinkejoj. TEJO pretas donaci la recepton sub licenco Creative Commons. Estis prezentata por ne-drink-ĉemuloj



senalkohola varianto, sub la nomo "Eterna komencanto" kaj tiuj dezirantaj ion varman povis aĉeti "Kafon 'sperantuj'", varman kafon kun lakto kaj rumo - inspiritan la lastjara IJK en Kubo. La papago de TEJO - Pepo - cetere, benis ĉiujn, dirante "ebriĝu!".

Kio okazis dum la IJK en Kubo, ke tio estis inspiro por "Kafo 'sperantuj'"?

Rumo estas la nacia alkoholaĵo de la kubanoj kaj dum la IJK ekstreme populara estis "Cafe Espagnol", kiun nia oferto provis humile imiti.

Ĉu la kombino de kafo kaj rumo bongustis?

Jes ja! Estis aparte veka, kiel energitrinkaĵo.

Ĉu tiuj novaĵoj en drinkejo estiĝis hazarde enmomente aŭ tio estis jam planita?

La organizantoj proponis al la estraranoj, se ili jam ĉeestas, organizi ion publikan pri TEJO, kaj komune ni alvenis al la konkludo ke plej mojose estus okazigi TEJO-drinkejon. La unuopaj "novaĵoj" estis fakte elpensitaj tiuvespere kaj "Piso de Pepo" havis kelkajn variantojn, ĝis la gustumantoj decidis pri la plej sukcesa.

Kiom da homoj ĉeestis la inventadon?

Ĉiuj ĉeestantaj estraranoj partoprenis en la preparado de la vespero. Krome, ankaŭ kandidatoj al la venonta estraro - kiel Michael Boris kaj Alisa - aktive kunhelpis. Sed la kulmino de la vespero estis ĉokolada batalo, kiu efektive estis absolute spontanea. Ĉio komenciĝis kiam oni manĝis la paskajn ovojn, kaj subite Michael-Boris petis konservi la flavaĵon de la ovoj. Li provis kuiri iun drinkaĵon tute neimageblan - kun varma ĉokolado, alkoholo kaj ovoj.

Kaj la rezulto?

Vi povas imagi la rezultintan guston...

Prefere mi ne imagas... Do ĉu oni ĵetis tason de la "strangaĵo"? Aŭ kion kompreni sub la "batalo"?

Nu, rezulte restis tro multe da mola ĉokolado, kiu trafe ricevis la kromnomon "Feko de Pepo".



Piso de Pepo - komparo kun sapo

Mi ne miras, ke ĝin volis neniu manĝi!

La ĉokolado fakte estis bongusta. Sed ĝi estis utiligita por interbatali (kiel en "akvobatalo").

Prefere mi ne imagas, kiel aspektis la ĉeestantoj kaj eĉ la ejo!

Iom malpura(j)...

Do, oni povas supozi, ke io simila okazos ankaŭ dum IJK!

Certe, ĉio povas okazi dum la IJoKo, kvankam TEJO donacas tiun ĉi tradicion al IJF - ja ĉiu Esperanta junulara aranĝo devas havi sian tradician batalon, ĉu ne?

Kaj nun pri vi - kion vi ŝatas trinki/drinki?

Mia mateno ne komenciĝas sen kafo, kvankam dum la tago mi povas digesti tute diversajn trinkaĵojn. El inter la alkoholaĵoj, mi plej ŝatas rozan kaj ĉerizan vinon kaj la helan bieron Mariachi el Turkio, kiu tamen kompareblas kun la (surprize bonaj!) bieroj de Kubo. Kompreneble, ekde nun, dum E-festoj mi drinkos nur "Pison de Pepo"!

Kion plej interesan (krom Piso de Pepo) vi trinkis?

Hmm, malfacilas vere diri. Eble, el inter la plej interesaj spertoj en mia vivo, estis la 82%-a tatra "teo", kiun ni drinkis dum la unua JES.

Kio estas kutima trinkaĵo/drinkaĵo de Israelo?

Verŝajne tamen kafo kaj vino. En Israelo estas (eble surprize) tre evoluinta kafe-merkato, kaj oni povas mendi en kafejoj multajn kaj bongustajn specojn de kafo. Dum vino estas jam el la bibliaj tempoj la Di-benita kor-ĝojiganto.

Do, havu ĉiam ĝojan koron! Dankegon por viaj tempo kaj intervjuo!

Nedankinde.

Ni estas ĉe Facebook!

Aliĝu al nia grupo TEJO-Tutmonde kaj komuniku kun ni kaj konigu viajn interesarojn!

Por junuloj, kiuj volas profesiigi pri esperantologio

SZABOLCS SZILVA - HUNGARIO

Esperantologio? Ĉu tiu scienc-branĉo ekzistas? Ĉu eblas studi pri Esperanto?

Mia respondo estas: jes, ĉe UAM (Universitato Adam Mickiewicz) en la urbo Poznań en la tria plej granda kaj plej fama universitato de Pollando.

Mi mem studas tie ankaŭ nun. Mi komencis miajn studojn en septembro 2010. Mi partoprenas la unu-jaran Instruistan Trejnadon, komunan programon de UAM kaj ILEI. Unue oni devas ĉeesti tie en septembro dum unu semajno por havi lecionojn pri metodiko de instruado, gramatiko kaj literaturo de Esperanto. Ekde septembro ĝis februaro de la sekva jaro okazas konsultado de la gvidaj profesoroj (mi menciuj ĉefe la instruistinojn Ilona Koutny kaj Katalin Kováts), kaj memstara studado. En februaro sekvas denova renkontiĝo same unu semajnon longa, sed ĉi tiam oni ankaŭ ekzamenigas pri la dum-semestraj lernitaĵoj. Ekde februaro oni devas prepari la finlaboraĵon post kies prezentado kaj finaj ekzamenoj oni ricevas ILEI-diplomon pri instruado.

Ĉi-septembre tiu trejnado ne okazos, sed komenciĝos pli profesia klerigo: la t. n. Interlingvistikaj Studoj. Tio estas postdiploma klerigo, kiu signifas ke antaŭ ol fini ĉi tiun tri-

jaran kursaron oni devas havi diplomon de iu ajn altlernejo aŭ universitato. La diferenco inter la de mi partoprenata kursaro, laŭnome Instruista Trejnado, kaj la menciitaj Interlingvistikaj Studoj estas la sekva: La Interlingvistikaj Studoj daŭras tri jarojn kaj fine oni ekhavas oficiale akcepteblan universitatan studfin-atestilon. La ĉeesta devigo estas la sama: po unu semajno en septembro kaj februaro.

Kial oni komencu en septembro studi pri Esperanto? Por ĝi profesia diplomita instruisto, por scii pli pri Esperanto kaj interlingvistiko, por fariĝi ano de profesia sed samtempe amikema grupo. Minimume dudek personoj estas bezonataj por ke la nova grupo povu starti. Sen dudek aliĝintoj la tuta esperantologia sekcio povas esti endanĝerigita. La limdato por aliĝi estas la 15a de aŭgusto 2011. Estas studkotizo, sed ĝi ne tiom altas kompare kun la kotizo de aliaj fakoj, kaj ankaŭ stipendio akireblas de pluraj fontoj. Venu ankaŭ vi kaj komencu studi kun ni! Kredu al mi, indas! Por pli da informoj skribu al interlin@amu.edu.pl. Programon vi povas rigardi ĉe <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>.



Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la Universala Esperanto-Asocio. TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj

TTT-ejo: www.tejo.org

programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto. La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas la kadro de niaj klopodoj.

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 1 76 - NL-301 5 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (01 0) 436 1 044 - Faksilo: (01 0) 436 1 751 ,
Retadreso: oficejo@tejo.org

Estraro de TEJO

Prezidanto, Eksteraj Rilatoj: Gregor HINKER gregor@tejo.org
Informado, unua Vicprezidanto: Oleksandra KOVYAZINA sasxa@tejo.org
Ĝenerala Sekretario: Paulína KOŽUCHOVÁ paulina@tejo.org
Landa Agado, Vicprezidanto: Irmina SZUSTAK irmina@tejo.org
Kasisto: Sergej TYRIN kasisto@tejo.org
Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto: Lukasz Maciej ZEBROWSKI lukiz@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la revuon Kontakto kun TEJO-Tutmonde rubriko
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn)

kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subteno la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi.

Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Eblas donaci ankaŭ tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

|a

*Internacia sendependa kinofestivalo
en internacia lingvo Esperanto*

kino sen limoj



**10a - 13a de julio, São Paulo
2011**

kinofestivalo.org

partnero



sponsoro

FAME



informaj partneroj

KRIAKTO

varsovia vento
elsendoj

aŭspicio



organiza teamo

